

Esperanto

EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA



Ĉion por la Redaktoro sendu al:
TOM FRASER,
2 Lady Helen Street,
Kirkcaldy, Fife.

Abonojn sendu al la Kasisto:
F-ino ANNE EYRE,
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,
Hamilton, Lanarkshire.

ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 58

Printempo 1965.

Jarabono, 3 ĝil. (6 steloj)

Nia ĉiujara manifestado de Esperanto trovas lokon ĉifoje en grava okcidenta urbo - Motherwell - inter la 14a kaj 16a de Majo. Taŭge estas, ke ni ne ĉiam sekvu la modernan modon per renkontiĝo en turista loko, ĉar inter la celoj de niaj kongresoj ne la malplej grava estas la propaganda, kaj tio estas pli fruktodona en iom grandaj komunujoj. Aligiloj, tre klare kaj plaĉe multobligitaj sur pal-blua papero, estis dissenditaj mense de Marto. Ili montras tiel ĝindan kiel stimulan sesdekan Kongreson.

Ekspozicio (kies kunton gvidos S-ano Connor de Glasgovo) malfermiĝos al la publiko en la Kongresejo, Y.M.C.A., Brandon Street, je la 2a p.t.m. vendrede. La saman vesperon, je la 7:30, S-ro Robert Mackay alparolos Publikan Kunvenon. Espereble kiel eble plej multaj el la kongresanoj penos alveni frutempe por ĉeesti tiun gravan okazaĵon.

Kongrue kun restadeto en tia industria abelujo kia estas Motherwell, la organiza komitato aranĝis por la anoj interesan viziton sabatmatene al fabrikejo por raŭpo-tirveturiloj. Sekvos tipa Kongrestago, kiu finos distra vespero en kiu oni petas ĉiun kontribui. Diservo dimanĉmatene kaj poste omnibusekskurso ĝis la bela distrikto de St. Mary's Loch estos taŭga kulmino al semajnfino de Esperanta aktivado, kies travivado estos inda kaj plesurdona kaj kies memoro estos inspira kaj agrabla.

Kiel diras nia proverbo - Oni invitas, venu, oni donacas, prenu !

Kongres-sekretario, Thomas Neil, M.A., 411 Castlemilk Road,
Glasgow. S.4.

Europa Esperanto-Konferenco 11:7 ĝis 17:7, 1965.

La organizantoj energie klopodas por certigi ĝindan eventon. Krom la multaj allogaj aferoj de pure plesura eco, prelegoj de kelkaj eminentaj esperantistoj aŭdeblas:- Lingvaj problemoj en la internacia politiko (Lapenna), La evidenta praktika valoro de Esperanto en internaciaj ekonomiaj rilatoj (Wensing), Esperanto en la literaturo (Steiner), Esperanto en ekonomi-politikaj rilatoj (Laurat), kaj aliaj. Por informo, skribu al B.E.A. aŭ U.E.A.

Resumante ĉion, oni prave asertas "VIVNO INDAS VIZITON".

ESPERANTO-MEMORFLOROJ.

Mi estas unu el tiuj bonŝanculoj, kiuj, dum sia vivo, havis la eblecon viziti plurajn Internaciajn Kongresojn de Esperanto. Pere de tiuj vizitoj kaj la akompanaj postkongresaj ekskursoj, mi jam akiris diversajn spertojn, ĉiam interesajn, kutime agrablajn, kaj eĉ foje amuzajn aŭ strangajn. La sekvanta rakonto priskribas unu el tiuj spertoj.

La unua Universala Kongreso de Esperanto kiun mi vizitis, okazis en Antverpeno en la jaro 1911. Tio estis ne nur mia unua Internacia Kongreso, sed ankau mia unua vizito al la kontinento de Eŭropo. Kvankam mi jam babladis en Esperanto kun samlandanoj, mi ankoraŭ ne sciis, ĉu mi povus komprenigi min al alilandaj samideanoj. Do, mi decidis provi la pretendon de Esperanto, dum mia restado en Belgujo, parolante kiel eble plej ofte al miaj alilandaj amikoj. Nu, mi baldaŭ trovis ke oni ne troigis la pretendon de la internacia lingvo - alivorte, mi, nur komencanto, sukcesis facile komprenigi min per Esperanto. Por mi la lingva barilo estis for. Sed tio ne estis la sola eltrovo de tiu vizito, ĉar samtempe mi eltrovis novajn alilandajn samideanojn, kun kiuj mi tuj amikiĝis, kaj restis en amikaj interrilatoj dum multaj jaroj. Unu el tiuj estis, kiel mi, juna instruisto, kiu venis el Germanujo. Kun li miaj rilatoj restis tre amikaj ĝis lia morto post la dua mondmilito, kaj pri li la sekvanta rakonto temas.

Kiam la unua mondmilito komenciĝis, mia germana amiko kaj mi fariĝis malamikoj, oficiale, kaj poste ni ambaŭ fariĝis oficiroj en la artilerio de la respektivaj armeoj. Post la milito ni denove renkontiĝis, ĉar nia naciismo ne estis tiel forta kiel nia Esperantismo. Je nia unua postmilita renkontiĝo, ni preparolis kelkajn el niaj dummilitaj spertoj, kaj trovis ke, dum unu periodo de la milito, ni postenis ĝuste sur kontraŭaj sektoroj de la frontlinio, kaj supozeble, unu belan tagon, ni eĉ pafis unu kontraŭ la alian.

Venis la jaro 1923, kiam okazis en Nurnbergo la ĝis tiam kaj ĝis nun plej multnombra Kongreso en la longa serio de niaj ĉiujaraj manifestadoj, kiam preskaŭ 5,000 aliĝis. Malfeliĉe, tiu jaro estis griza periodo en la ekonomia vivo de Germanujo, kaj la enloĝantoj suferis pro ĉiam kreskanta inflacio. Tio estis la terura ekonomia malsano, dum kiu prudentaj homoj, kiuj konservis sian bonhavan en bankoj, trovis ke, kiel neĝfalo en rivero, ĝi fine tute malaperis aŭ almenaŭ fariĝis preskaŭ bagatela. Por ni, la vizitantaj turistoj, la bildo havis tute alian vizagon. Ĉio fariĝis neordinare malkara, kaj por ni prezoj en hoteloj estis ridinde malaltaj. Ekzemple, mi mem loĝis dum la tuta kongres-semajno en luksa hotelo en Nurnbergo, kun plena pensio, tamen mia kalkulo por la semajno estis, en brita mono, proksimume dek ŝilingoj. Kiam mi iris al banko por ŝanĝi anglan pundon, mi devis kunpreni mian teknon, por poste porti la germanan monon al mia hotelo, ĉar tiom da paperbiletoj mi ricevis. Fakte, je tiu tempo, la kurzo estis pli ol miliono da markoj por ĉiu angla pundo. Kia sperto! Por la unua fojo en mia vivo mi estis milionulo!

Mia germana amiko, nun lernejestro de vilaĝa lernejo apud Dresdeno, invitis min kaj mian karavaneton, 20 skotojn el Glasgovo, viziti lian vilaĝon post la Kongreso kaj resti tie dum kelkaj tagoj. En sia lernejo li jam dum konsiderinda periodo instruis Esperanton al klaso de 40-50 gelernantoj, kun aĝoj proksimume 11-12. Do, tiuj lernejoj havus la novan sperton, bonvenigi alilandajn Esperantistojn kaj babli kun ili. Post la solena fermo de la

Kongreso en Nurnbergo, ni vagonare atingis la stacidomon de Dresdeno, kie la lernejestro atendis nin, kaj poste, per loka vagonaro, li kondukis nin al la vilaĝo. Tie trafis nin granda surprizo, ĉar ŝajne la tuta Esperanto-klaso atendis nin. Pluraj el la infanoj havis siajn ĉaretojn, ofte uzataj de la patrinoj por hejmenporti varojn el la vilaĝaj butikoj. La nuna celo de la ĉaretoj estis forporti la pakajojn de la skotoj al la domoj, en kiuj ili loĝos dum la restado en la vilaĝo. La lernejestro antaŭe aranĝis ĉiujn detalojn. Ĉar la skotoj loĝos ĉe la gepatroj de la junaj Esperantistoj, tio signifis ke, se la gepatroj ne scipovas la lingvon, la infanoj devas fariĝi interpretistoj: por ili granda honoro - ankaŭ leciono por la gepatroj! Tiu aranĝo estis utila ambaŭflanke, ĉar pere de tiuj vizitoj, la skotoj havis la maloftan sperton loĝi ĉe germana familio, kaj la gastigantoj, pere de siaj gastoj, rikoltis tre bonvenan enspezon. Mi mem havis la honoron kaj plesuron esti gasto ĉe la estro kaj lia bonkora edzino.

Mia amiko ne nur antaŭaranĝis nian akcepton, sed ankaŭ nian programon dum tiuj memorindaĵoj tagoj. Tiu programo havis promenojn kun la klasanoj, vizitojn al interesaj lokoj, inter tiuj la fajenca fabriko en Meissen, kaj koncerton en la vilaĝa lernejo kie la infanoj mem provizis ĉiujn erojn de la programo. Post tiu lasta aranĝo, la skotoj decidis esprimi sian dankon, donante al la infanoj "festeneton" en la lernejo. En tiuj grizaj tagoj, viando por vilaĝanoj kaj infanoj estis vera lukso. Do, ni decidis, ke tiu frandaĵo estos la ĉefplado de la festo. Mi petis mian amikon, ke li faru la necesan mendon ĉe la loka viandisto, kaj samtempe informu la infanojn pri la proponita aranĝo. Venis la tago, certe atendita de la infanoj kun granda ĝojo. Kiam, je tiu mateno, mi malsupreniris de mia dormoĉambro por matenmanĝi, mi trovis mian amikon staranta apud la fenestro kun mieno deprimita. Ŝajne io malagraba okazis. "Kio ĝenas vin?", mi demandis. "Okazis katastrofo," li respondis. Poste li informis min ke, frumatene, la viandisto vizitis lin, por sciigi ke, dumnokte, la preso de la mendita viando plialtiĝis kaj nun kostus plian milionon da markoj. "Kion fari nun?" malgaje petis la lernejestro. "Facila afero," mi respondis, "mi kolektos la monon de mia skota karavano, ĉar mi estas certa ke ili ĝoje helpos al la infana festo." Fakte la kolektado signifis bagatelan sumon, unu ŝilingon de ĉiu skoto. Estas okazoj kiam eĉ skotoj volonte donacas monon! Do, ne estis necese, ke mia amiko nuligu la mendon pri viando. Tiun posttagmezon, en klasoĉambro de la vilaĝa lernejo, okazis la festeneto, kaj la radiantaj vizaĝoj kaj gaja babilado de la infanoj estis por la skotoj pli ol kompenso.

Jen ekzemplo de unu el la multaj interesaj spertoj, per kiuj Esperantisto povas riĉigi sian vivon. Persone, mi ofte rememoras tiujn feliĉajn, kaj iom strangajn okazaĵojn de tiu kongresa jaro, kaj eĉ de tempo al tempo, kiel maljuna pensiulo, mi sopiras la tempon, kiam mi estis provizora milionulo.

DAVID KENNEDY.

* * * * *

Ĉina Esperanto-Ligo informas pri la bonvena fakto, ke Radio Pekino disaŭdigas en Esperanto ĉiun vendredon kaj sabaton de 20.00 ĝis 20.30 (Greenwich), per ondoj 51, 40.4, 30.1 metraj. Raportojn pri aŭdebleco sendu al :-

ESPERANTO-FAKO, RADIO PEKINO, PEKINO, ĈINIO.

ESPERANTA EDZIGO

Merkredon, la 3an de Marto, okazis en Grand Hotel, Glasgovo, la edzigo de Jack Casey, Skota reprezentanto de TEJO, kaj Mia Zupanić, instruistino el Zagreb, Jugoslavio. Ĝi estas la filino de Esperantistoj, kaj ŝi mem flue kaj bone parolas la lingvon. Nur de sia alveno en Skotlando antaŭ kvar semajnoj ŝi komencis lerni la anglan lingvon, tiel Esperanto devas esti la komuna lingvo de la novaj geedzoj. Ĝi certe sufiĉis por la amindumado! La du unue renkontiĝis ĉe Junulara Kongreso en Bulgarujo, kaj poste ĉe la Esperanta Insulo en Jugoslavio.

Pastro Hugh Martin, M.A., B.D., kondukis privatan edzinceremonion en la Esperanta lingvo, kaj du junaj Glasgovaj Esperantistoj, Joe Cent kaj Anne Malone, estis honoraj fraŭlo kaj fraŭlino. Sekvis edzigmango kaj danco, kun 50 partoprenantoj, el kiuj triono estis Esperantistoj. Kelkaj el la telegramoj, paroladoj kaj kantoj estis en la Esperanta lingvo.

Pastro Martin poste aperis por intervjuo ĉe la televida programo "Here and Now", respondante al kelkaj demandoj pri la edzigo, kaj oni petis, ke li traduku en la internacian lingvon la frazojn de la ceremonio. Poste aperis sur la ekrano, en Esperanto, vortoj de bondeziroj por la juna paro.

Skotaj Esperantistoj kunigas en bondeziroj, kaj esperas por la novaj geedzoj multajn jarejn da ĝojo kaj feliĉo.

H.M.

* * * * *

LA SANKTA BIBLIO EN ESPERANTO

La tajpskripto de la Sankta Biblio en Esperanto, tajpita plejparte de D-ro Zamenhof mem kaj parte de S-ino Zamenhof, estas kredeble la plej valora Zamenhofaĵo en la mondo. Post la morto de S-ro J.M. Warden, Edinburgo, Sekretario de la Biblia Komitato, la tajpskripto kuŝis plurajn jarojn en sekurejo. Ĉar ĝi estis en unuopaj folioj estis risko, ke kelkaj el ili perdiĝos. Lastatempe S-ro Mackay, prezidanto de la Edinburga Esperanto-Societo, bindis la tajpskripton en kvar volumojn, kio ebligas, ke oni povas konsulti ilin sen risko de perdo.

Plurfoje estis diskutoj pri elekto de fina ripozejo de ĉi tio, la ĉefverko de D-ro Zamenhof. La Edinburga Esperanto-Societo fine decidis, ke la plej taŭga loko, ne nur por la tajpskripto, sed ankaŭ por ĉiuj rilataj paperoj pri la Biblio, kiuj estis postlasitaj de S-ro Warden, estas la biblioteko de la Brita Esperantista Asocio en Londono. Survoje tien la dokumentoj restos kelkan tempon en la manoj de Pastro W.J. Downes, kiu nuntempe plenumas taskon metitan sur lin de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, la eldonistoj de la Biblio en Esperanto.

La tajpskripto kaj aliaj dokumentoj estis senditaj al Pastro Downes je la 12a de decembro, 1964.

* * * * *

INVITO

AFUDMARA SOMERA ESPERANTISTA SEMAJNO en Balarus (Sudo de Francio) de la 12a ĝis la 19a de julio, 1965. Nur por tendumantoj.
Informos vin: LENTAIGNE, 3, av. Gaillarde, MONTPELLIER, Francio.
(Sendu respond-kuponon)

R E C E N Z O J

"LEGU KAJ LERNU" estas serio de 6 leglibretoj por infanoj aperanta en 1965, ĉiuj 24 paĝoj, 17 x 11 cm-oj. Jarabono 21 steloj (10ŝ.6p) - 1 ekz-o 3 steloj. Mendebila ĉe la redaktoro, Derrick P. Faux, Valley Farm House, Charndon, nr. Bicester, Oxon, Anglujo.

N-ro 1, "El Afriko". Mi ja legis kaj lernis novajn vortojn, ekzemple, antidorko, kaj kudo, kaj mi nun scias, ke arakidoj ne estas idoj de iu besto "arako". La enhavo de ĉi tiu libreto por infanoj estas aparte interesa al mi, ĉar mi tre ŝatas lerni pri birdoj kaj bestoj kaj eĉ pli interesas min legi pri aliaj landoj. Kiel skoto mi ĝojas ricevi tiom por malgranda prezo - kantojn, fabelon, enigmon, kaj krom tio mi samtempe lernas kuiru sukeraĵon kaj ludon Afrikan. Mi gratulas al S-ro Faux kaj atendas senpacience la duan eldonon de "Legu kaj Lernu". Ĉu estus eble eviti la tro oftan uzon de "ig" ?

J.D.W.

N-ro 2, "Idetoj", klare montras la ĝustan uzon de la sufiksoj ID kaj ET, ilustrita per simplaj frazoj en kiuj estas priskribitaj la moroj de birdoj kaj bestoj el multaj landoj. Tiel, la aŭtoro tenas la intereson de la infanoj dum lernado, pere de temo kiu allogas la junajn lernant(in)ojn, kaj plus akriĝas la apetiton per aldono de ĉarma rakonteto pri ursido. Fine sekvas artikolo, "Lulkantoj", kune kun la muzikoj kaj vortoj de lulkantoj diverslandaj por doni eĉ pli da ĝuado al lernado. Ĉi tiu serio (el kiu ĉi tiu libreto estas la dua) estas bonega por lernejoj, precipe se la enhavo de la sekvontaj libretoj konservadas la altnivelon de la unuaj du numeroj.

KION VI FARAS? Kromaj 28 paĝoj (ne unu el la supre recenzita seriokomenco, sed samformata). Kvankam ĉi tiu libreto principe estas pri verboj de farado, samtempe ĝi enkondukas la uzon de sufiksoj kaj kunmetitaj vortoj por demonstri kiel oni povas diversmaniere esprimi frazon, kaj ankaŭ kiel distingi inter la diversaj vortoj de simila signifo. La libreto, kiu enhavas grandajn, klarajn presliterojn, estas tre taŭga por infanoj (kaj plenkreskuloj!) kiuj bezonas ekzercojn sin en parolado kaj memsprimo. Ĝi ankaŭ estas facile portebila en la poŝo.

Ann Eyre.

(a) ESPERANTA-PORTUGALA PROVERBARO kaj (b) "AMO PER PROVERBOJ": (a) aranĝita de, kaj (b) tradukita de, A. Couto Fernandes. Eldonita de Liga Brasileira de Esperanto, Rio de Janeiro. 168 paĝoj. Prezo ne montrita sur la libro.

La libro komenciĝas per aprezo de S-ro Fernandes, kiu estis entuziasma kaj sindediĉinta prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo de 1909 ĝis 1946. Tri kvaronojn de la libro okupas proverboj el la Proverbaro Esperanta de D-ro Zamenhof kun paralela kolono da proverboj samsignifaj en la portugala lingvo. Por Esperantistoj, kiuj studas la portugalan lingvon, ĉi tiu libro povas esti tre helpa. Estas tre interesa okupo imiti S-ron Fernandes, kaj parigi esperantajn kaj skotajn diraĵojn. Mi donas plurajn ĉi tie, sed troveblaj estas multaj:- Kiu bojas, ne mordas (A barkin' dug'll no bite). Plej bona gvidilo estas la lango (Ye've a guid Scotch tongue in yer heid). Kiu tro ripozas, baldaŭ almozas (A gangin' fit's aye gettin'). Donacetoj subtenas amikecon (It's nae loss what a freen gets). En la trijanda semajno (Never in a month o' Sundays). Ĉiuj milionoj konsistas el milonoj (Mony a mickle maks a muckle). Propra volo ordonon superas (Will tae Cupar, maun tae Cupar). Memorante, ke la Zamenhof-proverbaro estas tradukita el la lingvoj rusa, pola, franca kaj germana, oni ne povas ne rimarki kiel similaj estas la pensoj de pluraj landoj.

"Amo /

"Amo per Proverboj" estas frua teatraĵo de la plumo de Artur Azevedo, populara kaj produktema verkisto en Rio de Janeiro. Li havis nur 15 jarojn kiam, en 1870, li verkis ĉi tiun komedion pri viro, kiu parolis sole per proverboj. La originalo kaj la esperanta traduko frontas unu la alian sur apudaj paĝoj. S-ro Fernandes, tradukante, plejeble elektis proverbojn el la Zamenhofa Proverbaro, kaj oni devas admiri lin pro lia sukceso tiurilate, ĉar estas vere amuse legi kiel li ĉenigas amason da proverboj. Mi dubas ĉu teatra prezento de la komedio plaĉus al mi. Tro multe da monologoj, mi kredas. Tamen, laŭ la antaŭparolo, ĝi havis multajn centojn da sukcesoj en Brazilo kaj Portugalujo. Mi serĉu taŭgan proverbon por fini. Jen! "Kiu kritikas kuraĝe, mem agas malsaĝe." R.M.

"KIEL ESTI AMATA" de Kazimierz Brandys, elpoligis Jerzy Grum. 65 paĝa broŝuraĵo. Eldonis Polski Związek Esperantystow, Varsovio. Preciza prezo ne montrita sed havebla kontraŭ U.L. Steloj, aŭ respondkuponoj.

Jen modernstila verketo kiu pruvas ankoraŭfoje, ke Esperanto povas esti brila, maŝinpafleca, eĉ enigma. La aŭtoro pentras pli ol skribas per vortoj, sentigas pli ol sciigas. Temas pri la intimaj pensoj, dum aeroplana vojaĝo de Varsovio ĝis Parizo, de radio-idolino kies bela, simpatia voĉo karigas sin (aŭ eble nur sin?) al milionoj da aŭskultantoj. Ili seniluziigis se ili eksciis siajn nudajn internajn pensojn, tamen, ni ne ricevas la senton, ke ŝi malsatas siajn admirantojn; ŝi estas tro vast-anima.

Ŝi kaŝis for de la Gestapo dum la militjaroj viron kiu rekompencas sin per abrupta forlaso post la liberigo. Ŝi pense komparas la situacion al tiu de Ofelio kaj Hamleto, sed ŝi travivis tiel, ke ŝi povus verki libron por Ofelioj, "Kiel esti Amata".

Oni povus rigardi la verkon plua atentigo pri la detrua efiko de milito, same al moralo kiel al la fizika korpo, aŭ pri la plureco de la homa naturo, aŭ pri la trompigo de la senkritika amaso aŭ pri la eraro kulti individuon. Alivorte ĝi estas multifaceta rakonto kiu, krom distri ankaŭ pensigas. Nepre ne taŭga por komencantoj, ŝoka ie, stimula ĉie. Ĝi estis filmita tiel sukcese, ke ĝi gajnis trioblan premion. La elstaraj ilustraĵoj estas el la filmo kaj tre kongruas kun la kalejdoskopa stilo de la teksto. Libro kiun oni volas legi duafoje.

* * * * *

STAFFA KAJ IONA.

Britaj Fervojoj estas pretaj - eĉ avidaj! - pruntedoni filmstrion kun 53 vidaĵoj de tiuj du skotaj insuloj. S-ro R. Mackay, Prezidanto de la Edinburga Societo, tradukis la priskribajn notojn en Esperanton, kaj montris la bildojn ĉe kunveno de la Societo je la 20a de januaro. S-ro Mackay volonte pruntedonos la esperantajn notojn al iu interesita grupo. Lia adreso estas, 135 Pilton Avenue, Edinburgh 5.

La adreso por pruntepeti la filmstrion estas, British Transport Films, 25, Savile Row, London.W.1.

FINE LA REGO TROVAS EDZINON

Rakontis D-ro Kenneth McLeod, Tradukis R. Mackay.

Iam estis reĝo de Fiune. Saga li estis, do kompreneble li volis preni al si saĝan reĝinon, kiu sidos flanke de la reĝa trono. Sed pasis jaroj, pasis jaroj, pasis pluaj jaroj, tamen neniun saĝan virinon li povis trovi.

"Kial estas," li kriis, "ke oni povus 'pajltegi' ĉiujn domojn en mia regno per saĝaj viroj, sed saĝaj virinoj estas tiel maloftaj kiel neĝo en somero?"

Unu tagon, kiam li jam delonge adiaŭis junecon, alvenis al lia kastelo bela princino bonguste ornamita per altvaloraj juveloj. "Belecon ŝi posedas; konsentite!" allasis la reĝo. "Sed, pli grave - ĉu ŝi posedas saĝecon?" "Kiu pli kapablas eltrovi tion ol vi mem?" diris liaj konsilantoj. La reĝo do metis al la princino tiujn demandojn:-

- Demando: Kio estas pli multnombra ol herbfolioj?
 Respondo: La roso; estas multaj gutoj sur ĉiu folio.
 Demando: Kio estas pli valora ol oro?
 Respondo: Lojaleco.
 Demando: Kio estas pli nigra ol la nokto?
 Respondo: Perfido.
 Demando: Kio estas pli ruĝa ol sango?
 Respondo: La vangoj de gastama viro, kiam gastoj alvenas kaj li trovas, ke li ne havas vinon por meti antaŭ ilin.
 Demando: Kio estas pli mola ol lanugo?
 Respondo: La fingroj de patrino.
 Demando: Kiu estas la plej fidinda spegulo?
 Respondo: La okulo de kamarado.
 Demando: Kiu estas la plej dolĉa kiso?
 Respondo: La kiso, kiun iu alia atendis.
 Demando: Kiu estas la plej maldolĉa kiso?
 Respondo: La kiso, kiun iu ajn povus ricevi.
 Demando: Kiu fanfaronas estas la plej vana?
 Respondo: La kluko de kokino, kiu demetis ovon. Ĝi metas ĝin sur la teron, sed ni metos ĝin en la poton.
 Demando: Kiu estas la plej admirinda juvelo?
 Respondo: Flamanta glavo en via mano, ho reĝo mia!

"Vi estas la plej saĝa virino, kiun iam mi renkontis," diris la reĝo, ŝin prenante per la mano. Li faris ŝin sia reĝino, kaj ili kune reĝis, saĝe kaj feliĉe, dum multaj jaroj.

* * * * *

S-ano John P. Murray, 1 Institution Road, Fochabers, Moray, skribas:

"Mi posedas grandan amason da esperantaĵoj: ESPERANTO, BRITISH ESPERANTIST, ESPERANTO MONTHLY (tre malnova), DIA REGNO, ESPERANTA ALVOKO, kaj aliajn, kiujn mi deziras fordoni al iu kiu povas utiligi ilin."

Li pretas sendi al iu kiu petos.

NIA AFERO ANTAŬ LA PUBLIKO.

Ke la Loka Komitato por nia 60a Kongreso jam efike eklaboras atestas la apero de kelkaj raportoj en Hamilton Advertiser, kaj aliaj. Unu portas la portreton de nia Prezidanto, Lawrence Mee, kaj enkadrigas ĝin per detaloplena, aferema teksto priskribanta la Federacion, S-ron Mee kaj tiel plu.

"Leven Mail", 23/9/64, aperigis sub la titolo "Esperanto News" raporton de Buckhaven kaj Methil Grupo, kiu aludis la 49an U.K. en Hago, la venontan en Tokio, kaj la nomojn de oficuloj de la Grupo mem.

"Dundee Telegraph", je 18/9/64, informis mallonge pri la origino kaj celo de Esperanto, kaj "Courier" (Dundee) presis leteron je 12/12/64, kies skribinto sciivolis (pro la ĉeesto de alilandaj futballudistoj) ĉu la arbitraciisto parolas Esperanton.

Pola Radio informas nin skribe, ke ili parolis en sia dimanĉa elsendo de 24a de januaro pri ero el nia Bulteno n-ro 57, en kiu ni raportis pri la parolado de S-ino Fraser antaŭ la societo "The Round Table", Kinross.

Kun kontento ni vidas (dankon al korespondanto), ke recenzo pri 'Ni parolu Esperanton' (R.H.M. Markarian) aperis sen aparta komento en la recenza rubriko de "The Scottish Educational Journal", 12a de Marto, 1965, sub 'Esperanto'.

La recenzinto, Ian Davison, plene kaj objektive pritaksas la meritojn de la libro. Kredeble tia senkria ekzameno de tia libro en tia loko pli benefikos ol paglonga partiana propaganda artikolo.

LA P E T S K R I B O .

Supozeble esperantaj Societoj, Grupoj kaj individuoj ĉie en Skotlando laboras kolektante subskribojn por la granda J.I.K.peticio al U.N. Kredeble la laboro estas tiel intensa, ke la diligenta kolegaro ne havas superfluan minuton en kiu raportu al la Bulteno pri la jam atingitaj rezultoj!

Ni scias, ke Buckhaven kaj Methil Grupo havigis multajn subskribojn de la anoj de Fife County Council, kaj krom tio F-ino Sinclair raportas volontan kunlaboron de lokaj magistratanoj.

Kirkcaldy jam ekspedis naŭ tutplenigitajn formulojn al Roterdamo, kaj cirkuligas kelkajn aliajn kiuj baldaŭ plenigos. La Okcidento kaj Edinburgo bonvolu raportu, kaj same izoluloj kiuj diligentas sed, ĝis nun, silentas.

P.S. Ni aŭdis, ke ekzistas esperantisto en Skotlando kiu ankoraŭ ne mem subskribis la peticion. Trovu tiun!

El la maksimumo de F-ino Jane Baird, karmemora ano de Edinburga Esperanta Societo:

Dum oni amas oni servas, dum oni estas amata oni estas necesa;
kaj neniu homo estas senutila dum li havas amikon.

(R.L. Stevenson) - iom mallongigita.

LA VERDA TURETO

"Uncle Tom, what is that star for in your buttonhole?" La petinto estis Katarino, sepjara filino de nevino.

"Tio montras, ke mi parolas Esperanton", brave respondis la onklo.

"Esperanton? Can I learn it?"

"Certe jes!" - kaj ŝi hejmeniris kun ekzemplero de "Mia Unua Esperanta Libro" kaj la vortoj - kato, hundo, tablo - eĥitaj de la pli junaj fratinoj, Shirley kaj Doroteo.

Pasis jaro - sed Katarino ne forgesis.

"Mummy," ŝi petis, unu tagon, "Could we not ask Auntie Minnie if we could have an Esperanto class here and I'll ask my friends to come?"

Tiel komenciĝis "La Verda Tureto", kiuj kunvenadas lunde je la 4a, ĉe 34 Balsusney Road, Kirkcaldy, sep-ok geknaboj, kiuj entuziasme komencis studi "Sub la Verda Standardo".

Ju pli frue des pli certe - ju pli volonte des pli lerte.

M.C.F.

Letero al la Redaktoro (tre bonvena!)

135 Pilton Avenue, Edinburgh 5.
la de Marto, 1965.

Kara S-ro Fraser,

Eble interesas la legantojn de "Esperanto en Skotlando", ke mi donis paroladeton pri la lingvo al ĉirkaŭ 20 knabinoj 17 aŭ 18-jaraj, kaj instruistino, ĉe la "angla" klaso en mia lernejo en Edinburgo. Mi celis montri kiel racie estus akcepti Esperanton kiel internacian lingvon, kaj parolis pri la historio kaj progreso de la lingvo, precipe en lernejoj kaj kolegioj en la mondo. Laŭŝajne ili trovis intereson en la temo kaj preskaŭ ĉiuj forprenis flugfoliojn.

Via,

Margaret Mackay

Ni dankas al Heroldo kaj Esperanta-Finnlando n-ro 3 (1965) por ĉerpaĵo el 'angla' lingva broŝureto pri la 25a Internacia Festivalo de Nuntempa Muziko de la Venecia Bienalo :

'The Festival will be surely a significative artistic manifestation: we hope that it will be a real contact between the public and the art of our time, and a progress towards the contemporary art of whom creates and listen to, that is towards the complete comprehension.'

Kiel kontribuo 'towards the complete comprehension' (t.e., al la kompleta kompreno) tiu propozicio estas, ĉu ne, fiasko.

Ĉiu ombro montras al la suno (Emerson)

IRO KUN KNABINO
(ROAMIN' IN THE GLOAMIN')

Harry Lauder.

Inojn multajn vidis mi ĉe fora ter' kaj tajd',
Sed la amo tiras nur al bela Kejt Makbrajd,
Mi ne estas tia ul', malŝpara per la lang'
Tamen mi surprizas min per nuna vortlavang'.

(Rekantaĵo) Iro post subiro de l' sun ĉe Klajd-river',
Iro kun knabino en krepusko laŭ prefer',
Post adiaŭ de la sun'
Antaŭ ol aperas lun'
Dolĉa estas iro kun knabino!

En krepusko vagis ni piedo ĉe pied'
Dufoje kisis mi, proponis al ŝi esti edz'
Timis ŝi, timis mi, estis ni ja par'
Sed ĉiam pli kuragis mi, revene al domar'.

Hieraŭ post promeno, ni hejmiĝis je bonhor'
Mi ĉe la fajrkamen', ŝin petis por la kor'
Jesis ŝi kaj saltis mi por danc' laŭ alta sving'
Nun per vizit' al juvelist', jen eta neta ring'. (El la angla/skota; T.F)

La ĉi-supra traduko celas honoru la ĉi-jaran Kongres-lokon.

KANTOFINO BONA - ĈIO BONA

(Kantebla laŭ la melodio de la Slovaka popolkanto
"Trifoli' ĉe Montfino" en la kantaro "La Juna Vivo.")

Li :- Ho ĉarma belulino, pli plaĉas vi ol vino.
Se promeni volus vi, tre feliĉa estus mi.

Ŝi :- Mi dankas vin, sinjoro. Mankas al mi fervoro.
Ne promeni volas mi kun trompanto kia vi!

Li :- Kial vi tiel plendas? Per kio mi ofendas?
Diru, kion faris mi, ke min nun riproĉas vi.

Ŝi :- Je lasta semajnfino vi dancis kun knabino.
Se promeni volas vi, iru nun kaj petu al ŝi.

Li :- Sed kedu min, fraŭlino, pri tiu junknabino;
Ŝi nur estis la fratin', tute ne la amatin'.

Ŝi :- En vero, mi ĵaluzis, kaj tial vin akuzis;
Do refoje petu al mi. Mi volonte iros kun vi.

Ambaŭ:- Lernu de nia kanto en lingvo Esperanto,
Ne tro frue diri "Fi!" en simila situaci'.

